



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 6
1975

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo
42-a (51-a) jaro
Dumonata

Inter homoj difavore

Jen vortoj el la plej ŝatata el ĉiuj evangeliataj rakontoj: La anĝela kanto en la kristnaska nokto ĉe Betleĥem. Sed la realeco de la vortoj estas ofte taksata per misfido kaj dubo. Nun denove ni estas en la kristnaska monato, kaj denove ni havos la kristnaskan feston. Kian feston? Du ordonoj estas la ĉefaj, laŭ la eldiro de Jesuo Kristo: Amu Dion kaj amu la proksimulon. Kiun el ambaŭ ni honoras, helpas, aŭ alproksimiĝas per nia «kristfestoj».

Proksimume tiel pensis kelkaj kristanoj antaŭ kelkaj jaroj, kaj el tio kreskis nova movado, kies nomo estas «Nova Kunuleco». Mi renkontis tiun ĉi movadon en Stockholm, dum mi vizitis kristanajn esperantoamikojn tie.

La komenco estis la kristnasko. Kaj ni eble povas diri, ke per tiu komenco Kristo denove naskiĝis, almenaŭ en la koroj de kelkaj homoj. Tiuj kristanoj — kiuj nun nomiĝas «la gejunuloj» — kolektiĝis en iu eklezia salono tuj antaŭ la komenciĝo de la

sankta vespero, ili post preĝa kunestado kunprenis termokafujojn kaj eliris por serĉi la senhejmulojn kaj regali ilin per varma kafo, kaj inviti ilin al la salono por kunestado.

En tiu salono la «gejunuloj» do deĵoris ek de la komenco de la kristfestoj ĝis la vespero de la 13a kristnaska tago, kaj ĉiam alvenis kaj foriris la senhejmuloj — kiuj nun ekhavis la nomon «la maljunuloj» — kaj sciis, ke en tiu salonego ĉiam estis homoj, kiuj volis kun ili havi kristfeston.

Tiu laboro ne haltis post la kristnasko. Tute male, el ĝi kreskis la Nova Kunuleco, kiu vere kreis novan kunulecon super ĉiuj limoj, super la limoj inter riĉulo kaj malriĉulo, inter ordinara burĝa homo kaj senhejmuloj, alkoholistoj, narkotikuloj, kaj ankaŭ super la limoj inter luteranoj, pentekostanoj, misiliganoj k.t.p. Ili simple renkontiĝis kiel kunhomoj. Kaj ili renkontiĝas, ĉiutage, surstrate, en hejmoj, en la kunvenejoj de la diversaj eklezioj. Kelkfoje oni salutas

unu la alian trans la trafikplenan straton per la voko «hej», alifoje ili venas sur la sama trotuaro, kaj salut- as per ĉirkaŭbrakumo. Eble je kon- sterniĝo kaj eĉ abomeno de aliaj ho- moj, sed por tiuj tio estas valorega parto de la vivo. Por kelkaj eble eĉ la sola punkto de la tago, kiu montras al ili, ke ilia restado sur la tero estas vivo, kaj ke ili estas io pli ol besto — nome homo.

Kompreneble ankaŭ tiu organizaĵo devas havi estraron. Kiel estri ĝin? Ĉu la «gejunuloj» surprenu sin ĉiun respondecon kaj faru ĉiun laboron? Nepre ne, tio estus tre nesaga ag- maniero. Ĉar per tio tuj malkaŝiĝus la fakto, ke oni tamen ne agnoskas la «maljunulojn» kiel veraĵoj. Tiukaze ili estus nur klientoj, iaj subhomoj, kiujn oni povas helpi kaj al kiuj oni povas doni materiajn kaj spiritajn almozojn, sed al kiuj oni ne povas fidi.

Tial la plej grava instanco de Nova Kunuleco estas la «grandkunveno», ĉe kiu ĉiu persono havas unu voton, sendepende ĉu li estas junulo aŭ mal- junulo.

Iam anĝeloj sin montris al simplaj homoj sur la kampoj de Betlehem. Ili diris: Ne timu. Ni havas grandan ĝojon al vi. Inter homoj regu difa- voro, ĉar la Savanto naskiĝis.

Nun anĝeloj — ĉar la vorto signifas sendito de Dio — denove proklamas tion inter homoj. Kaj ni povas de- nove per espero kaj fido akcepti nian Savanton kaj la anĝelan kanton:

*Gloro al Dio en la supera alto,
kaj sur la tero paco,
inter homoj Difavoro.*

R.

RADIO

La Aŭstria Esperanto-Instituto skri- bas al ni pri la multaj okazoj dum kiuj ni aŭdas radion el Aŭstrujo: festsemajnoj de Vieno, Salzburg kaj Bregenz aŭ la novjarkoncerto de la filharmonika orkestro.

Dum tiuj elsendoj oni uzas ĝis tri fremdaj lingvoj, kaj post kelka tempo verŝajne venos ankoraŭ kelkaj. La Instituto instigas al ni helpi, ke tiu lingva diskriminacio malaperu per uzo de unu lingvo — la internacia — aldone al la nacia, tiel ke la arta prezentado restu ĉefafero.

Se vi volas helpi, skribu poŝtkarton al: «ORF, P.K. 700, A-1041 Wien», sed ne kun akra kritiko, sed amika konsilo.

Radio Roma — Esperanto-elsendoj — C.P. 320, I-00100 Roma, ankaŭ me- morigas pri leteroj. La radio jam la 28an de majo listigis la leteron n.ro 500, el kiuj venis 8 el Norvegujo. Tia saluto estas treege grava al tiuj, kiuj laboras en radio.

La programoj de R. Roma okazas ĉiun dimanĉon de la 21.00 ĝis 21.20 sur ondlongoj (kiloherczoj) 30,90 (9710), 41,24 (7275) kaj 50,08 (5990). La radio sendos, laŭ peto, senpagan ilustritan programbroŝuron.

La Pola radio (Poŝtfako 46, Pl 00-950 Varsovio) ankaŭ senpage sendas pro- graminformilon kun detaloj pri ondo- longoj kaj elsendohoroj, kaj ankaŭ la libron «Pollando, nombroj kaj fakt- oĵ». Ili substrekas ke la vespera dis- aŭdigo je la 22.30 estas bone aŭdebla en tuta Eŭropo sur ondlongo 200 m.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Provizora redaktoro:

Hans Amund Rosbach

Johan Hammond Rosbach

Adreso de la redakcio:

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N
(Limdato por manuskriptoj: la 20.
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

Dankon

Dum periodo mi respondecis kiel «provizora redaktoro» de nia revuo. Heziteme mi prenis la taskon, ĉar miaj tagoj jam estas pli ol plenplenaj da laboro, kaj tiu ekstra laboro de- nove prenis horojn for de la familia vivo. Sed mi esperis je helpo kaj komprenemo.

Nun mi forlasas la ĉefredaktoran seĝon, al la pli pasiva rolo kiel mem- bro de iu kaj ia redaktora komitato, kiu neniam kunvenas, kaj kiu nur perletere kontaktiĝas. Kaj mi estas tutplena da danko. Unue kaj ĉefe al Vidar Vik, kiu transprenas la taskon, la stafeton. Mi transdonas ĝin kun la scio kaj espero, ke la gazeto prosperos kaj evoluos per tio.

La dua danko vorto iras al la estraro de NEL kun sia prezidanto, kiu ege helpis dum tiu ne facila tempo. Kaj la tria al ĉiuj, kiuj alsendis ma- terialon por la gazeto. Kelkfoje mi

mire pensis: Vere, ankaŭ nun mi povas plenigi la paĝojn per sufiĉe interesa legaĵo. Alifoje restis en mia tirkesto pecoj, kiuj nepre devus esti inter la paĝoj de la revuo, sed al kiuj estis neeble trovi lokon. Kaj fine an- kaŭ dankon al vi, legantoj!

Hans Amund Rosbach



La kontorfondaĵo

Pli frue	kr. 1372,00
Aase Haube Nielsen »	30,00
Harda Danielsen	» 15,00
C.S.B. »	20,00
R. Bugge-Paulsen	» 60,00
Alta Esperantoklubb »	5,00
K. Ek	» 4,00
T. Aasgaard	» 16,00
Agot Pedersen	» 25,00
	<hr/>
	kr. 1547,00

Kampanjo Reisæter

Pli frue	kr. 1300,00
Aslaug Karterud	» 200,00
Valborg Malling	» 100,00
Leif H. Bryn	» 200,00
Reidar Lindstrøm	» 100,00
Harda Danielsen	» 100,00
R. Bugge-Paulsen	» 100,00
	<hr/>
	kr. 2100,00

La Propaganda Fondaĵo

Plie frue	kr. 423,00
Agot Pedersen	» 25,00
	<hr/>
	kr. 448,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

Sciigoj de N.E.L.

Kotizoj por 1976. Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave, ke ĉiuj membroj pagas sian kotizon frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj al N.E.L.

Nova Ĉefdelegito de U.E.A. por Norvegujo. Post la forpaso de Alfred Skyberg la Liga Konsilantaro elektis s.ron Kjell Gustavsen nova Ĉefdelegito.

U.E.A.-kotizoj 1975. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto ESPERANTO ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1976. Pagu al la loka Delegito, aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, Kjell Gustavsen, Rasmus Engers v. 10, Oslo 9, poŝtĝirokonto 1.33.29. La kotizoj restas senŝanĝaj: Membro kun Jarlibro kr. 50,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton ESPERANTO) kr. 100,00, membro de «Societo Zamenhof» (nova formo de subtenanta membro, ankaŭ ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 300,00. — Fariĝu Individua Membro de U.E.A.!

Kursoj. Jam urĝas plani la kursojn de la venonta printempa sezono. Precipe la kluboj, kiuj ne aranĝis kursojn dum la nun pasinta aŭtuno, nepre klopodu aranĝi kursojn por komencantoj dum la printempo. Sen kursoj ne estos progreso! Ankaŭ rektaj membroj povas sukcese aranĝi kursojn.

Korespondaj kursoj. Se ne okazos aliaj kursoj en via loko, varbu por la korespondaj kursoj! Ĉar nun ankaŭ unuopaj lernantoj ricevas ŝtatan subvencion, la kurskotizoj malaltiĝis (unika fenomeno en nia tempo!). Elementa parto kostas kr. 76,00, perfektiga parto kr. 76,00, ambaŭ partoj kune kr. 120,00. Por membro de studrondo la prezoj estas kr. 54,00, 54,00, 108,00.

Gazeta kurso. Klopodu igi gazeton en via loko aperigi nian gazetan kurson. Ĝi estas havebla ankaŭ por gazetoj ofsete presataj. Petu al N.E.L. pri regularo kaj provlecio.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L.; blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

Taskotabelo por kluboj. — *Decembro:* La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi sian kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj varbadon de novaj Individuaj Membroj de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo.

Johan Hammond Rosbach:

Mirtelekskurso kun komplikaĵoj

La flava domo de Avino ne plu estis videbla. Jonas Rodal kaj lia kuzo Jonas Rodal faris mirtelan ekskurson.

Estis sufiĉe streĉa ekspedicio. Unue preter la fragokampo de Onklino Dotti, kaj ĝi estis sankta teritorio evitenda por infanaj piedoj. Poste inter la budo kaj ribujo, kaj laŭ la grenkampo de Haftor Edelmann. Haftor Edelmann estis la najbaro, cetere la kuzo de la patroj de la Jonaso. Ne estis facile iri laŭ la kamprando, ĉar oni ne rajtis treti inter la avenŝalmoj. Kaj estis danĝerege meti la piedojn en la sovaĝejon nur tri-kvar

colojn for de la kamprando, ĉar tie la vipuroj svarmis. Onklino Dotti vidis unu tie antaŭ tri aŭ kvar jaroj. Tiam sekvis la plej malfacila afero: suprengrimpi la globrondan rokon kun la mirtela sitelo enmane — kaj ne gliti malsupren pro la velurverda musko, kiu grandtavole malfiksiĝis. Kaj imagu la reiron kun beroj en la sitelo! Nu, la roko nature ne estis kiel tuta globo, estis nur parto de la globo, kiu montriĝis super la tero, sed Jonas — la pli aĝa el ili — ofte demandis sin, ĉu la globformo daŭriĝas sub la tersurfaco, sed lia patro

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas, ke la kasisto faras tion kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj ĝenerale la printempan agadon, pritraktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba alvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la dua jarduono de la pasinta jaro (bl. A 10/E 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkvarono. Okazis unu estrarkunveno, kaj oni elsendis unu cirkuleron. La 44a Norvega Esperanto-Kongreso okazis en Tromsø. Ĉe la 60a Universala Kongreso en Kopenhago salutanto de N.E.L. estis Otto Prytz, la norvegan registaron reprezentis R. Bugge-Paulsen. Oni distribuis al la adresitoj la rezoluciojn de la kongreso en Tromsø. Nia Ĉefdelegito de U.E.A. forpasis, kaj la estraro serĉis novan. Oni diskutis la statutŝanĝon de U.E.A. Oni plu laboris pri la planoj por la vojaĝo de ges.roj Philip en Norvegujo.

La Liga Estraro

diris, ke li ne kredas tion. Plej supre sur la roko estis nur ŝtaldrata barilo, feliĉe sen pikiloj — kaj oni jam estis en la paŝtejo. Kaj tiam la flava domo de Avino ne estis plu videbla. Nur la griza ardeza tegmento kaj la kamen-tubo estis sekuraj apogpunktoj.

Antaŭ ili estis la praarbaro. Haftor forhakis multajn arbojn por havigi paŝtejon por la bovinoj. Jonas — la malpli aĝa el ili — kiu havis la pli intiman kontakton kun la bienulo Haftor, informiĝis, ke la bovinoj paŝtiĝis en alia loko hodiaŭ. Sed tio ne signifis, ke ĉio estas sendanĝera. Estis ja tre malseka tereno, plurloke preskaŭ marĉeca — kaj tie oni devis grandarke ĉirkaŭiri — cetere estis ĉie grandaj, malmolaj bovinkukoj, kaj ili estis plenaj de abomenindaj, brunaj muŝoj, kiuj svarmis sur la vizaĝojn, se oni ĝenis ilin, kaj se oni ne bone atentis, oni povis riski treton meze en fekaĵon, kaj tio estus bela skandalo! Estis neimageble, kion dirus tiam Panjo kaj Onklino Dotti.

La malfacila distanco estis pasita senakcidente. La pli aĝa kuzo Jonas iris antaŭe, ne nur ĉar li havis du jarojn pli, kaj sekve estis pli granda kaj pli kuraĝa, sed ankaŭ ĉar li loĝis en la montaro, kie estis riĉaj eblecoj por ekskursoj en la arbaroj, dum la kuzo, kiu nomiĝis Baleno en sia hejmurbo, konis nur nudajn rokojn kaj strandŝtonojn.

La mirteloj ankoraŭ ne estis laŭdezire maturaj. Plurloke ili estis tute verdaj, sed la plimulto ruĝiĝis kaj ŝajnis fariĝi normalaj mirteloj, sed ili estis acidaj, kaj ili estis sensukaj. Tie kaj tie troviĝis bero vere bona, kiu sonorigis la fundon de la sitelo —

esence gaja sono, sed ĝi ja atestis pri magra kaptajo. Tial oni devis kiel eble plej rapide kovri la fundon, por ke la kuzo ne aŭdu, ke oni havas nur malmulton en la sitelo. Tia nevolita kontrolo ne estis dezirinda.

La montano Jonas trovis lokon, kiun favoris la suno. Rapida gustumo decidis: ĉi tie la beroj vere estas maturaj. Kaj ne malumultaj. Do oni formetu la kovrilon, kie oni povas trovi ĝin — oni kaŭre komencu. Rapide la sitela fundo kovriĝis — dum strandŝtona Jonas daŭre perfidiĝis per la sono de malmolaj, nematuraj mirteloj sur la sitelan fundon.

La tempo efektive rapide pasis. Strange, ke tiom multaj diras, ke berplukado estas enuiga! La ĉirkaŭa mondo malaperas. La suno agrable bakas la kapon, kaj la sterkmuŝoj zumas, kreante someran etoson. Sed tio efektive estas nur fona muziko, kaj la pensoj propravole migras, kaj la somera libertempo estas ĝuinda. Eĉ la danĝeraj vipuroj estas forgesitaj pro la feliĉo.

(Daŭrigota)

Usonano

loĝanta en Islando deziras kolekti «desegno-seriojn» el Aftenposten, Arbeiderbladet, Bergens Tidende, Dagbladet, Lofotposten, Verdens Gang (VG). Se necese, mi estas preta pagi malgrandan rekompencan por ĉiu pecc. Bonvolu skribi al: Roger A. Budnick, Freyjugata 25, REYKJAVIK, Islando.

Letero de C. Støp-Bowitz

Estimata Redaktoro!

En N.E. n.ro 5/1975, p. 71/75 vi publikigas «Leteron de Lapenna», en kiu li skribas i.a.: «konstatinte la sukceson de la kontraŭneŭtraleca konspiro en UEA...».

Mi deziras demandi al la membroj de N.E.L., la norvegaj membroj de U.E.A., ĉu ili konstatis ian deflankiĝon de la neŭtraleco de U.E.A. dum la tempo post la kongreso en Hamburgo? Se jes, vi devus esti ne reelektintaj min kiel prezidanton de N.E.L. dum nia landa kongreso en Tromsø.

La faktoj estas, ke okazis nenia konspiro aŭ «puĉo» en Hamburgo, la elektoj okazis tute laŭstatute kaj demokrate, kaj la nuna estraro de U.E.A. estas minimume same rigora pri la neŭtraleco, kiel la antaŭa. Pri tio atestas ĉiuj faktoj. Se ne estus tiel, mi ne restus en la estraro de U.E.A. Por konfirmi sian fidelecon al la neŭtraleco la Komitato de U.E.A. akceptis la rezolucion aldonitan al ĉi tiu letero.

Kun sinceraj salutoj, via

C. Støp-Bowitz.

Rezolucio de la Komitato de U.E.A.

La Komitato de U.E.A. en siaj kunidoj en Kopenhago dum la 60a Universala Kongreso de Esperanto de la 26a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto 1975

KONSTATIS:

ke lastatempe aperis en pluraj naciaj

ĵurnaloj artikoloj, en kiuj oni kontestas la politikan neŭtralecon de Universala Esperanto-Asocio,

DEKLARAS:

ke al tiuj diskonigoj kaj gravaj akuzoj mankas ĉia bazo de vero kaj ke ne ekzistas unu sola pruvo, kiu pravigus tiajn misprezentojn,

ke la politika neŭtraleco de U.E.A., kiel ĝi estas priskribita en la artikoloj 4 kaj 13 de ĝia statuto, ĉiam estis, kaj ĉiam restos la fundamenta gvidprincipo de ĝia tutmonda agado kaj daŭre konsistigas le neŝanceleblan bazon de ĝia ekzistado,

ke la Asocio estas preta kunlabori kun ĉiuj fortoj strebantaj al unueca komuna celo,

REKOMENDAS:

ke la estraro kaj la redaktoro de la revuo *Esperanto* evitu diskutojn pri la longe diskutitaj faktoj kaj pri la personecoj de la nunaj aŭ antaŭaj gvidantoj en la Movado,

PETAS:

ke tiu ĉi deklaro estu vastskale diskonigata per ĉiuj taŭgaj rimedoj de informado.

Korespondu!

19-jara ĉehino dez. interŝ. bildkartojn kun esperantistoj en Skandinavio. Marie Voračkova, Trebičskeho 740/II, 37701 Jindřichuv Hradec, Ĉeĥoslovakio.


Dek knabinoj 15—19-jaraj, kamentinoj, volonte korespondos kun norvegaj esperantistoj. Skribu al: Leszek Irek, Klauski 5, PL-43-300 BIELSKO-BIALA, Polujo.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Redaktoro: Odd Kolbrek



LA BONFARTLABORO ĈE N.S.B. (NORVEGA ŜTATA FERVOJO)

Ĝi organiziĝas de la Deĵor- kaj Bonfartkontoro, kiu stariĝis en 1949, estas gvidata de Bonfartĉefo, kaj estas rekte subigita de la Ĝeneral-direktoro. La labortaskoj estas jenaj: Evoluado de bona labormedio ĉe N. S.B., enkalkulita sanstat- kaj gardservo. Evoluado de bonaj kontakt-kaj kunlaborkondiĉoj, efika utiligo de la monsumoj destinitaj al la bonfartlaboro por la personaro. La sanstat-servado okazas i.a. pere de la entreprenkuracistsistemo, kiu stariĝis en 1951 kaj kiu faras periodajn kaj selektivajn sanstatkontrolojn, kontrolojn de sanec- kaj sanitarkondiĉoj en la laborejoj, esploradon de la kaŭzo por foresto de la deĵoro pro malsano, havigadon de laboro por personaro kiu estas malhelpita je elekto de laboro, k.t.p. La gardo-kaj mediolaboro okazas pere de kunlaboro inter la gvidantoj de la entrepreno kaj la personaro. Ĉiujare ellaboriĝas indikoj pri la nombroj de laborakcidentoj, fariĝas ampleksa informado kaj aranĝiĝas instruado por deĵorantoj kiuj okupiĝas pri gardoferoj. La kunlaborkomisionistaro stariĝis en 1947 kaj konsistas el multaj komisi-

onoj, kiuj prezentas speciale signifoplenajn aferojn al N.S.B. kaj al la personaro. La interna informagado okazas altgrade pere de la kunlaborkomisionoj kunlabore kun la personaro. Estas pere de apogo de la entrepreno farita signifoplena loĝejkonstruado por personaro, kiu bezonas loĝejon, ĉu pro deviga ŝanĝiĝo de deĵorloko, ĉu pro aliaj kaŭzoj. Stariĝis loĝejasocioj laŭ la memposedantisistemo kun apogo de la entrepreno pere de havigado de arĥitektoj, elpruntado de labormaŝinoj, transportado de materialo k.t.p. Multaj ne plu uzataj stacidomoj kaj relgardistdomoj aplikiĝas kiel feriolokoj por la personaro. La faksindikatoj de la personaro kaj N.S.B. en kunlaboro konstruis modernan feriolokon en la montaro. (Legu pri «Rapham» en «Fervoĵista Paĝo» nr. 8 1967.) Ĉi tiu loko, kie la personaro kun familio povas ferii, havas altan normon kaj malaltajn prezojn.

La Deĵor- kaj Bonfartkontoro havas bonan kunlaboron kun la libertempasocioj de la personaro kaj apogas ilin kaj ekonomie kaj alimaniere.

★

Ĉu vi tradukas?

Etter å ha tatt examen artium drog Sibelius til Helsinki for å studere jus. Imidlertid var han mere interessert i musikk, så han meldte seg inn på en musikkskole. Han var en god fiolinist og hadde allerede komponert flere verker. Da han hadde vært i hovedstaden i et år, måtte familien gå med på at han ville bli musiker.

*

Ja, her er den nye teksten. Prøv først å oversette selv, så tar vi kommentarene her etterpå.

1. setning.

Esperanto har den store fordel at det har et komplett partisippsystem, 3 aktive og 3 passive partisipper, henholdsvis fortids-, nutids og fremtidspartisipper. Når man kan uttrykke samtidighet med et partisipp («idet han tar eksamen : taende eksamen»), er det logisk at man også bør kunne uttrykke fortidighet ved partisipp. Fortidighet er ikke det samme som fortid. Fortidighet uttrykker *fortid i forhold til en annen tid*, i vårt tilfelle noe som går forut for fortid — det som vi uttrykker ved pusskvamperfektum på norsk. Legg merke til at denne partisippalkonstruksjonen vi her bruker, bare kan brukes når det er samme subjekt for partisippet som for setningen partisippet tilhører. Man kan altså ikke bruke partisippalkonstruksjon på esperanto for å uttrykke «etter at sønnen hadde tatt eksamen, drog familien til Helsinki». Et eksempel på nettopp dette vil man finne i setning nr. 4.

På samme måte som *a* er den karakteristiske vokal for nutid (*estas*) og *i* for fortid (*estis*) i verbets tider, er de samme vokaler karakteristiske for nutidighet, som vi vanligvis kaller samtidighet, og fortidighet i partisippene (*estanta* og *estinta* i adjektivisk bruk, *estante* og *estinte* i adverbial bruk).

«ta en eksamen». Det er mange som smertelig har erfart at en eksamen ikke er noe man bare «tar» — man «fullfører» en eksamen: *plenumas ekzamenon*. Selvsagt kan man også si *fari ekzamenon*.

«dra til et sted» har vi nylig gjennomgått i denne spalten. Les det om igjen.

2. setning.

«imidlertid» er et ord som har flere betydninger. Hvis det som her bare angir en motsetning, er *sed* det rette ordet. Av og til kan motsetningen også få et snev av innrømmelse og betydning «likevel»; da bruker vi *tamen*. Hvis «imidlertid» uttrykker «i mellomtiden», bruker vi *dume* el. *intertempe*. «være interessert i» heter *interesiĝi pri*, *havi intereson pri*. Legg spesielt merke til at *pri* er den beste preposisjonen.

«melde» er også et nokså mangfoldig ord. Ofte kan det være det samme samme som *raporti* el. *enonci*, melder man noen til politiet, er det *denunci*. Melder man seg til eksamen, passer *sin prezenti*, mens «melde seg inn» kan gjengis ved *aliĝi* eller *enkribiĝi*. Akkurat i vårt tilfelle vil vi imidlertid foreslå *ekstudi*.

3. setning.

«En god fiolinist». Kan man bruke

bona? Ja, fordi *bona* bl.a. betyr at de karakteristiske egenskaper for arten er til stede, eller at noe er i overensstemmelse med formålet, altså med andre ord *taŭga*. Videre betyr *bona* «gunstig», f.eks. når man ønsker «god dag» og «hjelpsom, human» etc.: *bona koro*, og endelig «vennlig». Merk derfor at *bona* ikke uten videre betyr «god» i betydningen «velsmakende». Da bør man nok si *bongusta*.

«flere» har to betydninger. Det kan angi et større antall (enn), og heter da *pli multaj*, men kan også, som her, bety «atskillige», og heter da *pluraj*.

4. setning.

«i ett år» angir en utstrekning i tid, dvs. et mål, og kan derfor uten videre settes i akkusativ (n-form uten preposisjon). Selvsagt kan man velge mellom *esti unu jaron* og *pasigi unu jaron*, men vi gjør for ordens skyld oppmerksom på to ting: 1) vanligvis er det ikke akkusativ (n-form) ved verbet *esti*, men det er når det tilhørende ord er predikatsord: *li estas profesoro*. 2) i uttrykket *pasigi unu jaron* er *jaron* ikke målsledd men objekt.

«gå med på» er det samme som akseptere, altså *akcepti*.

«han ville bli» angir fremtid i forhold til «måtte gå med på» (selv om det jo er fortid sett ut fra i dag!). Da esperanto opererer med såkalt relativ tid, vil man her, forskjellig fra norsk, bruke fremtidsformen av verbet.

«bli musiker»: «bli» betegner vel her ikke først og fremst «gå over til» dvs. «bli noe man ikke var før», derimot «være for fremtiden». Sammenlign dansk: dansken spør ikke en gutt

hva han skal bli når han blir stor, men hva han skal være. Vi foreslår *esti*.

Forslag til oversettelse av de fire setninger:

Farinte la studentekzamenon, Sibelius iris al Helsinki por studi juron. Sed li pli interesiĝis pri muziko, tiel ke li ekstudis ĉe muzika lernejo. Li estis bona violonisto kaj jam komponis plurajn verkojn. Kiam li estis en la ĉefurbo unu jaron, la familio devis akcepti, ke li volas esti muzikisto.

Ak III

Ĉe esperantistoj de Jalta

Sur la suda bordo de Krimeo ĉe la Nigra Maro en pitoreska naturo situas la urbo Jalta. Ĉiujare vizitas ĝin 1,5 milionoj da sovetlandanoj kaj multmiloj da eksterlandaj gastoj. Bedaŭrinde multaj eksterlandaj geesperantistoj ne kontaktiĝas kun la Jalta samideanaro.

Tial ni informas al ĉiu, kiu intencas viziti Krimeon, ke en Jalta ĉe la klubo de maristoj la esperantogrupo «Mevo» kunvenas. Kaj tiu klubo okazigis studrondeton, kiu aranĝos letervesperon la 15. de februaro 1976, al kiu ni petas poŝtkartojn. La studrondeto estas inter «pioniroj», kaj ni deziras kontaktiĝi kun infanoj el ĉiuj landoj.

Sovetunio 334200 Jalta dvorec pionerov «Esperanto».

M. Cimberov

Ni prezentas:



Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (I.E.K.A.)

KUNLABORANTA FAKA ASOCIO DE U.E.A.

Prezidanto: D.ro Werner Bormann, Germanujo
Vicprezidanto: Raif Markarian, Britujo
Ĝenerala sekretario: Jean Guillaume, Francujo

Personoj, kiuj havas aŭtomobilon, ofte multe vojaĝadas, ankaŭ eksterlande, kaj kompreneble ili ofte spertas lingvajn malfacilaĵojn. Tial kelkaj aŭtomobilemaj esperantistoj komence de 1965 fondis la Internacian Esperanto-Klubon Aŭtomobilistan, kies iniciatinto kaj unua prezidanto estis la belgo Maurice Jaumotte, post lia morto la italo G. Grattapaglia, kaj de 1974 la germano d.ro Werner Bormann.

La celo de la Klubo estas solvi la lingvan problemon en aŭtomobilistaj medioj, helpi al samideanoj, kiuj trairas veturile diversajn landojn, kaj riskas havi akcidentojn, paneojn, riparojn. Tiel ni pruvas la praktikan utilecon de nia lingvo. La celon oni klopodas atingi i.a. per tio, ke laŭeble multaj el la membroj anoncu sin kiel Fakdelegitojn de U.E.A. pri S.O.S.-aŭtoservo. Alia grava tasko estas interesi pri Esperanto personojn, kiuj laboras en aŭtoriparejoj aŭ benzinvendejoj kaj publikigi listojn pri tiaj lokoj, kie oni povas komprenigi sin per nia lingvo.

Hodiaŭ I.E.K.A. havas 921 membrojn en 29 landoj en ĉiuj 5 mondpartoj, kaj U.E.A.-Fakdelegitojn pri S.O.S.-

aŭtoservo en 53 lokoj. Sed tio estas nur komenco, la nombroj devas fariĝi multoble pli grandaj!

I.E.K.A. havas nur dumvivajn membrojn, kaj la kotizo estas nur 7 norvegaj kronoj. Jes, vi legis ĝuste: nur 7 norvegaj kronoj unu fojon por ĉiam! Ĉiu aliĝinto ricevas belan insignon glueblan sur la aŭton (oni eĉ povas depreni kaj reglui ĝin!).

En Norvegujo I.E.K.A. havas nur 11 membrojn, sed sendube multe pli da esperantistoj en nia lando posedas aŭton. Do, aliĝu al I.E.K.A., sendante 7 kronojn al la provizora landa reprezentanto, C. Støp-Bowitz, Camilla Collets vei 3, Oslo 2 (ekz. per poŝtmarkoj en letero). La Klubo povas vivi nur, se ĉiujare aliĝas multaj novaj membroj.

I.E.K.A. laboras pri ses-lingva fakterminaro pri aŭtoj. Jam nun oni povas ricevi ĉe FIAT (Direzion Publicità, Corso Marconi 10, I-10125 TORINO, Italujo) senpage aŭtoturisman vortareton en 6 lingvoj kaj prospektojn kun desegnaĵoj de aŭtomobiloj en Esperanto, kaj ankaŭ pruntepreni 16-mm kolorfilmojn en Esperanto.

C. Støp-Bowitz

Recenzoj

Kjell Walraamoen kaj Lina Gabrielli: Ni devas vivi. 81 poemoj. 154 paĝoj. Eldonisto: J. Regulo, La laguna. Prezo: n.kr. 18,-.

Lirika debuto de norvego kaj italino kiuj inspirus unu la alian verki sentoriĉajn poemojn pri la amo, la vivo kaj la naturo. La unua parto de la libro estas de Kjell. La revanta arbhakisto transiras de la kruda arbhakilo al la ĉizileto, kaj ĉisas versojn kiuj vibrigas poemajn sentojn. Li melankolie meditas pri la vivo kaj la naturo. La poemoj pri la amo estas nur parto de liaj poemoj, sentemaj kaj ĉarmaj kiel ekzemple «Ce vi» kaj «Letero al mia amato». Mi manksent- as la ritmon kaj rimon en lia poemaro. Kial ne utiligi tiujn rimedojn por krei eĉ pli belan poezion? La debuto estas promesinda, ni atendas la novan poemaron kun intereso.

La dua parto de la libro estas de Lina kaj povus havi la titolon «Ni devas ami!» Ŝi enkondukas per la vortoj: «Mi ne estas poeto, mi estas nur virino». Ŝi jam debutis kiel prozisto, kaj mi parte samopinias kun amiko de mi kiu diris ke liaj poemoj ne estas poezio, tiel ankaŭ mi povus skribi! Ĉu poemoj, ĉu amleteroj aŭ noveletoj — tro multe da ĝuo fariĝas enuo. La dua parto de la poemaro en «Ni devas vivi» estas antiklimakso. En «Demandsigno» ŝi demandas al sia kara: « — ĉu ci persistas en promesoj ciaz; aŭ ĉu ci estas nura revanto. Pro tio mi nomas cin Demandsigno mia.»

Jes, pri amo *li* estas demandsigno, sed ne pri liriko; pri liriko *ŝi* estas demandsigno, mi preferas ŝian prozon.

Johan Matland

Unua sesio de la kvara tutlanda popola kongreso de la Ĉina Popola Respubliko. — Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1975.

Broŝurita libro 80-paĝa kun pluraj bildoj donas ankaŭ en la Internacia Lingvo la dokumentojn de la ĉina kongreso, en kiu oni donis al la lando novan konstitucion, kaj ankaŭ publikigas tiun konstitucion, aprobitan de tiu kongreso la 17. de januaro ĉi-jare.

Ro

Literatura Foiro. Eld.: La Patrolo, Pantano 17, Milano.

Post kiam la eldonantoj de Nica Revuo haltigis tiun, kaj la Norda Prismo mortis, la literaturaj gazetoj en Esperanto ne abundas. Ni ricevis nun la pli modestan, du-monatan Literaturan Foiro, kies numeroj estas 16-paĝaj, kaj kiuj donas almenaŭ abundon da liriko. Ni volonte mencias tion al niaj literaturemaj legantoj.

PAŜO ANTAŬEN

Unu el la unuaj libroj esperantlingvaj kiujn mi aĉetis nomiĝas «Kie estas la eklezio de Kristo?». Mi ĝin mendis, ĉar ĝi estis malmultekosta, sed ankaŭ ĉar ĝia titolo indikis temon, kiu min interesis.

Ĝin ricevinte, mi konstatis ke estas eldonaĵo de Internacia Katolika In- formejo (IKI) kaj akra atako kontraŭ

la Protestantaj eklezioj. Mi kun intereso ĝin legis, kaj trovis ke la ekleziojn kiuj estis atakataj, mi ne konis, kvankam mi sufiĉe ofte ĉeestis diservojn. Mia skeptiko kontraŭ la Roma katolika eklezio kreskis.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi trovis Kristanan Esperantistan Jarlibron en mia poŝtkesto. Kun surprizo mi konstatis ke estas eldono de la katolika kaj la protestanta esperantomovadoj (IKUE-KELI) komune. Mi ja scias, ke trifoje ek de la jaro 1968 aperis la Kristana Esperanto-revuo, kiu ankaŭ estas komuna eldono de la samaj organizaĵoj. Tiu ĉi tamen estas la unua komuna jarlibro.

Mi trovas liston pri publikaĵoj de IKI, sed ne trovas la titolon de mia malnova libro. Mi trovas tradukitan artikolon el la oficiala ĵurnalo de la Vatikano (L'Osservatore Romano) okaze de la 25a datreveno de la Ekleziena Mondkonsilantaro de la Eklezioj. La roma katolika eklezio ne estas membro de la Mondkonsilantaro, sed tamen la artikolo tradukita de IKI konkludas: «... ĝi estu instrumento ĉiam utila en la manoj de Dio por la restaŭro de la unueco de ĉiuj Kristanoj kaj por la plenumo de la misio de la Eklezio.»

La Kristana Esperantista Jarlibro estas paŝo antaŭen, ĉar ĝi respegulas la novan klimaton en la ekumena movado. Oni ne kaŝas la diversecon, sed kunlaboras respektante unu la alian.

La amplekso de la jarlibro ankaŭ estas paŝo antaŭen, almenaŭ kompare al la antaŭaj adresaroj de KELI. Ĝi kompreneble donas pli da informoj, kaj tial ankaŭ pli veran bildon de la kristana esperantista mondo. La in-

formoj pri publikaĵoj estas bonaj, kaj la teksto de ekumenaj preĝoj estas utila.

La papero estas bonkvalita, sed kompreneble la redakto povas perfektigi. Proseraroj ankaŭ troviĝas. En la listo de norvegaj kelianoj ankoraŭ troviĝas la nomo de la mortinta pastoro Leif Nyborg. La adreso de la norvega reprezentanto nun estas: Nøkleveien 31, Oslo 6.

La ĉijare eksiginta prezidanto de KELI povas esti fiera. Dum la 14-jara prezidanteco de Adolf Burkhardt KELI faris grandan paŝon antaŭen.

V.

Someraj Universitataj Kursoj

SUK-sesio '76 en Antwerpen
Sludobjektoj:

biologio, matematiko, sociologio

Venontjare oni okazigos la trian sesion de la Someraj Universitataj Kursoj. Tiu ĉi esperantlingva faka aranĝo en 1976 konsistos el kursoj pri biologio, matematiko kaj sociologio, sub gvidado nur de tiuj personoj, kiuj havas la rajton prelegi en neesperantista universitato. La 3-a SUK-sesio okazos en nova loko, nome en Antwerpen (Belgio), inter la 8-a kaj la 29-a de aŭgusto. Oni povas ĉeesti en la SUK-sesio dum unu, du, aŭ tri semajnoj. Interesemuloj povas kontakti la jenan adreson: Someraj Universitataj Kursoj, B.P. 9, B-4000 Liège 3, Belgio. Ĉi tie estas mendeblaj ankaŭ la kursotekstoj de la antaŭaj SUK-sesioj.

Pasporta Servo

La Pasporta Servo estas relative nova iniciato por praktike utiligi Esperanton, inventita kaj gvidata en la nomo de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Ĝiaj celoj estas: Ebligi al esperantistoj vojaĝi eksterlanden malmultekoste kaj inteligente, en intima kontakto kun la loĝantaro, kaj: Ebligi al nevojaĝemaj esperantistoj helpi al vojaĝemuloj ĝui riĉoplenajn homkontaktojn kaj akiri internacian amikaron.

La Pasporta Servo do klopodas starigi en la tuta mondo reton de senpagaj gastigemuloj por permesi malmultekostajn vojaĝojn kaj kontaktojn kun lokaj kulturoj. Per tiu aranĝo gajnas ankaŭ la nevojaĝemuloj, kiuj, gastigante eksterlandajn samideanojn, povas akiri internaciajn kontaktojn kaj amikojn.

Ĝis nun la Pasporta Servo disponas cent loĝeblecojn tra la tuta mondo, sed dum ĝia unua jaro ĝiajn servojn utiligis jam 150 personoj.

Bedaŭrinde en Skandinavio tiu ĉi servo havas nur tre malmultajn reprezentantojn. Se vi estas preta disponigi al vojaĝemuloj liton aŭ du, anoncu vin al la skandinavia reprezentanto: s-ro Wim Posthuma, Soldatgatan 40, S-723 45 VASTERAS, Svedujo. — La gastoj ofte estas kontentaj kun loko (matraco) sur planko aŭ lito. Estas grave, ke gastigantoj troviĝas antaŭ ĉio en la grandaj urboj. Oni publikigas listojn de gastigantoj, kun informoj pri nombro da litoj, tempoj konvenaj ktp.; por aperi en la listo de 1976 oni devas anonci sin

Norvega Kroniko

KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO

Eksterordinara ĝenerala kunveno okazis pro la altiĝo de la kotizo al N.E.L. ekde 1/1 1976, decidita dum la 44a landa kongreso en Tromsø. Pri tio klarigis C. Støp-Bowitz post kiam la prez. bonvenigis. Pro tio ankaŭ la kotizo al la klubo altiĝos, kaj oni unuvoĉe aprobis la altigon de la diversaj kategorioj de la kotizo.

En 1906 aperis en tiama gazeto «Dagens Nyt» en Ålesund interesa artikolo pri Esperanto, kiun laŭtlegis Tom Arbo Høeg. Inger Richard kaj Pepita de Caspary klarigis pri — kaj montris — memrikoltitajn legomojn kaj plantojn, kiuj poste, dum la kutima lotumado, aplikiĝis kiel gajnaĵoj.

Farante mallongan raporton pri la 44-a landa kongreso C. Støp-Bowitz i. a. priparolis la diversajn aranĝojn kaj ankaŭ la postkongresan ekskursion al Norda Kabo.

Vendiĝis libroj por 53,00 kr.

Raportis O. K.

1/10. La prez. bonvenigis, kaj post kantado de Kluba marŝo C. Støp-Bowitz referis cirkuleron de N.E.L., i. a. pri la altiĝo de la kotizoj kaj pri tio, ke provizore oni sendu U.E.A.-

antaŭ la 31a de Decembro 1975. La listojn oni sendas al dezirantoj.

Espereble ankaŭ nia lando venontjare aperos en la listo de la Pasporta Servo!

kotizojn al N.E.L. — Margrete Landmark paroladis pri la programo koncerne la virinan jaron dum la 60-a Universala Kongreso en Kopenhago. Otto Prytz paroladis pri la lingva flanko de la virinaj problemoj. Li donis ekzemplerojn pri ambaŭseksaj — kaj pri sekse neŭtralaj vortoj, kiuj troviĝas en la norvega lingvo kaj en Esperanto. — Kun gitarakompano de Esther Wollebæk ni fine kantis.

Vendiĝis libroj por 75,00 kr.

20/10. Post bonvenigo Kirsten Ek referis dankleteron de John Berggreen pro la belaj floroj kiujn li ricevis de la klubo dum sia restado en malsanulejo. — La dana samideano Else Margrethe Nielsen montris, post kiam ŝi unue dankis pro la invito al la klubo, lumbildojn. Unue de sia hejmo kaj poste de la somerdomo de Else Bugge-Paulsen ĉe la Tyrifjordo en kiu ŝi tiun jaron partoprenis la tradician St. Johano-vesperan kluban ekskursion. De sia 6-semajna restado en Hindujo ŝi montris multajn lumbildojn dum ŝi tre interese klarigis pri ili kaj pri siaj impresoj de tiu lando, kaj ŝi ekspoziciis belajn kartojn kaj objektojn de Hindujo. — Pri «Ferio kaj libertempo» kiu okazos en «Sjølyst» 14/11—23/11 ĉi-jare kaj en kiu la klubo partoprenos, klarigis Kirsten Ek.

Vendiĝis libroj por 86,75 kr.

5/11. La prezid., post bonvenigo, klarigis pri la pagado de la kotizo al la klubo, kiu ek de nun, laŭ decido de la estraro, okazos pere de poŝtĝirokonto aŭ bankĝirokonto. — Asbjørn Ness faris en humorplena maniero interesan programon pri glaciaĵo. Li

aranĝis malgrandan ekspozicion, paroletis pri glaciaĵo, disdonis gustumprovaĵojn kaj demonstris diversajn aplikadmanierojn, dum li ankaŭ rakontis anekdotojn. — Dum la kafopaŭzo ni ĝuis kafon, glaciaĵon kaj kringojn. Poste Asbjørn Ness montris filmon pri la fabrikado, la transportado, k.t.p. de glaciaĵo. — C. Støp-Bowitz informis ke Kjell Gustavsen fariĝis nova ĉefdelegito de U.E.A., kaj Kirsten Ek klarigis pri la partopreno de la klubo en «Libertempo 75» kiu okazos en «Sjølyst» 14/11—23/11. Oni bezonas multajn helpantojn por dum ĉi tiu okazaĵo klarigi al la publiko pri Esperanto, kaj ŝi admonis al la membroj anonci sin.

Vendiĝis libroj por 13,50 kr.

Raportis O. K.

LA URSO, Sarpsborg,

regule kunvenas ĉiun duan merkredon. Unue okazas lingva instruado, ĝuste nun sur la elementa nivelo, pro tio, ke kelkaj gimnazianoj deziras lerni nian lingvon. Poste estas enspezigo de mono al la kluba kaso per diversaj konkursoj kaj variaj ellotadaj sistemoj. Cetere la kaso ĵus fortiĝis per 200 kronoj el la ŝtata mono por kultura agado asignita pere de la komunuma kultura komitato. — De tempo al tempo Rosbach legas ĉapitrojn el sia verkata libro «La Murda Domo» kaj en «Lumbilda horkvarono» rakontis pri Øland, Gotland kaj Venezia.

SAUDA ESPERANTOKLUBB

13/10. Kunveno ĉe ges.roj Aagot kaj Arthur Bjerke. La prez. Norman Birkeli bonvenigis al la unua kunve-

stina Kielan, ul. Ciolkowskiego 5/57,
PL-93-510 LODZ, Pollando.

Mi tre deziras korespondi kun norvegaj esperantistoj, Vasilij V. Grigorenko, ul. Ciolkovskego, 67, kv. 197, 313028 POLTAVA-28, U.S.S.R.

Itala fraŭlino 30-jara ŝatus korespondi kun norvegoj, ankaŭ por interŝanĝi bildkartojn. Mirella Merlani, Via Giovanni Verga 69, I-00137 ROMA, Italujo.

30-jara ministro deziras korespondi edziĝcele kun samideanino laborema, kiu ankaŭ gepatrojn havas (mi mem kreskis en orfejo). Skribu al Johano Beleznai, H-2800 Tatabánya, Györi ut. 16/3, Hungarujo.

no ĉi aŭtune, kaj li laŭtlegis cirkuleron de N.E.L. Rilate al propono de ges.roj Philip pri travojaĝo de Norvegujo vizitonte esperantajn klubojn, ni decidis ke ni volonte akceptos ilin por partopreni klubkunvenon. — En kunveno printempe la prez. disdonis adresojn al kiuj ni sendu salutleterojn. Nun kelkaj el la membroj ekhavis respondojn de la diversaj radiostacioj al kiuj oni sendis leterojn. Belajn broŝurojn kaj interesajn presadojn kunsekvis kaj estis laŭtlegetaj de la ricevintoj. — La ĉefprogramo ĉi vespere estis raporto de la kongreso en Kopenhago de ges.roj Matland. Elna rakontis interese pri la kunvenoj kaj la diversaj aliaj agadoj dum la kongreso, kaj Johan montris lumbildojn kaj rakontis pri siaj impresoj.

La vespera mastrino regalis tre bonguste dum vigla babilado. Ankorau ĉe la tablo Johan Matland recenzis la libron «Ni devas vivi» de Kjell Walraamoen kaj Lina Gabrielli, kaj poste li legis kelkajn belajn ampoemojn el la libro. — Olav Andersen gvidis la «Lingvan duonhoron». Du libroj estis ellotitaj, unu estis «Ni devas vivi».

O. Andersen

★

KORESPONDU!

Mi tre volus korespondi kun gesamideanoj en Norvegujo. Mi estas 26-jara, interesiĝas pri ĉiutaga vivo de samaĝuloj, kulturo kaj folkloro, kaj kolektas bildkartojn. F.ino Kri-

NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 30
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo:

Boks 942, Oslo. Postgiro 100 32

ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 31
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Kjell Gustavsen, Rasmus Engers v. 10,
Oslo 9. Postgiro 1 33 29

La redakcio:

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,
6500 Kristiansund N. Telefon: 77 6 20

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1

Trykt i HAAVES BOKTRYKKERI, Brumunddal